

Prefacio de Advento – 1  
(solena tono)

ADORU 055.11

Ve - re estas inde kaj juste, ĝus - te kaj sa - ve,  
ke ni ĉiam kaj ĉie danku al Vi, Pa - tro sank - ta,  
per Kris - to, ni - a Sin - jo - ro.

Per Sia unua veno en la humileco de nia ho - ma na - tu - ro,  
Li plenumis la promeson donitan ekde la pra - tem - po,  
kaj malfermis al ni la vo - jon al la e - ter - na sa - vo.

Kaj kiam Li denove venos kun la Di - a ma - jes - to,  
ni glorplene ricevos la pro - me - si - tajn bo - nojn,  
kiujn nun ni kuraĝas es - pe - ri kun vi - gla a - ten - do.

Kaj ti - al kun la anĝeloj kaj ĉiuj ĉi - e - laj sank - tu - loj,  
ni ĝoje kunkantas la himnon de Via glo - ro,  
sen - fi - ne di - ran - te: